Ensalutu / Kreu novan konton

artikolo | diskuto | redakti | historio

Viaj donacoj ebligas al Vikipedio plu ekzistadi ! Dankon pro via subteno.

VIKIPEDIO
*La libera enciklopedio*

navigado
- Ĉefpaĝo
- Komunuma Portalo
- Diskutejo
- Aktualaĵoj
- Lastaj ŝanĝoj
- Hazarda paĝo
- Helpo
- Donaci

serĉu

Vikipedio por vi

Ek! Serĉi

iloj
- Ligiloj ĉi tien
- Rilataj paĝoj
- Specialaj paĝoj
- Presebla versio
- Konstanta ligilo
- Citu ĉi tiun artikolon

aliaj lingvoj
- Afrikaans
- Akan
- Alemannisch
- □□□□
- Aragonés
- Anglo-Saxon
- العربية
- [illegible]
- Asturianu
- Aymar
- Azərbaycan
- Башҡорт
- Boarisch
- Žemaitėška
- Беларуская
- Беларуская (тарашкевіца)

## Vikipedio por vi

**Vikipedio por vi** estas libro de Ziko van Dijk, germana historiisto. Ĝi prezentas la fenomenon Vikipedio kaj klarigas, kiel pli bone utiligi la liberan enciklopedion. Per konsiloj kaj ekzemploj ĝi priskribas kiel oni mem fariĝas sperta vikipediisto. La libro estas 64-paĝa kaj nigroblanka.

Vikipedio en Esperanto estas nuntempe la sola vere universala enciklopedio en Esperanto, kun pli ol cent mil artikoloj pri esperantistaj kaj neesperantistaj temoj.

La libro-kovrilo

Enhavo [kaŝi]


1 Enkonduko
2 Bazaj kapabloj
3 La fenomeno Vikipedio
4 Legi Vikipedion
5 Kontribui al Vikipedio
6 Uzi bildojn
7 Kion fari nun
8 Vortlisto
9 Fontindikoj kaj dankoj


## Enkonduko

[redakti]

Ekde januaro 2001 ekzistas la libera enciklopedio Vikipedio, kaj ankoraŭ en la sama jaro fondiĝis ĝia esperantlingva versio. Intertempe la projekto Vikipedio kreskis al unu el la plej grandaj retejoj en la mondo; ĝi estas praktike uzata de studentoj, sciencistoj, profesiuloj, hobiuloj kaj ĉiaj aliaj homoj. Tia sukceso ne venis de si mem: pluraj cent miloj da homoj jam kontribuis al la tuta, multlingva enciklopedio. Ili ĉiuj kunlaboras volontule, nepagite, ĉar ili ŝatas verki kaj transdoni sian scion. Fari etajn redaktojn aŭ registriĝi estas facile, tamen oni devas sufiĉe multon lerni por fariĝi sperta vikipediisto. Same pri Esperanto: lerni la bazojn ne estas multe da peno, sed pliperfektiĝi kaj akiri rutinon estas alia afero.

**www.vikipedio.net**


ISBN 978-80-89366-01-9

9 788089 366019


espero

Ziko van Dijk VIKIPEDIO por vi

espero

Ziko van Dijk

# VIKIPEDIO
# por vi



**Kiel ĝi funkcias,**
**kiel vi kontribuas**


obalka.indd 1 25.10.2008 14:47:29